

BIBLIOGRAFIO KAJ RECENZOJ 019.941

(048.1)

221.05 = 089.2.07 : 221.03 + 221.014

221.05 = 1 : 221.014

LA MALNOVA TESTAMENTO EN TRADUKOJ
ESPERANTA KAJ ALILINGVAJ

de J. KOHEN-CEDEK

RECENZA ARTIKOLO PRI:

D. B. GREGOR: La Esperanta traduko de la Malnova Testamento. — Dek-biblia konkordanco de 518 diskutindaj versoj.

XII + 57 paĝoj; 14,5 × 20 cm². Propra eldono de la aŭtoro. En komisiono ĉe „Heroldo de Esperanto”, Scheveningen. Prezo: 8,40 steloj; 2,10 guldenoj; 4 ŝil.

I. La Biblio kiel „best seller”

La disvastiĝo de la Biblio diverslingve, poparte aŭ komplete eldonita, atingis laste, laŭ informo de la „Brita kaj Alilanda Biblia Societo”, rekordan nombron de 26 milionoj da ekzempleroj. Oni prave povas rigardi la Biblion kiel la plej disvastigitan libron en la mondo.

La nombro de la lingvoj, en kiujn la Biblio estas almenaŭ parte tradukita, superas milon, sed tutplene ĝi aperis en 210 lingvoj. La plimultiĝo de tradukoj kaŭzas la apero de „novaj” lingvoj; novaj — en senco de posedo de propra skribarto kaj literaturo. Estas ili precipe la lingvoj de aziaj, afrikaj kaj similaj, dumlonge ne progresintaj popoloj. La presitaj por ili bibliotradukoj estas ofte la unuaj libroj kiuj aperas en iliaj lingvoj. Tia, ekz., estas la bibliotraduko en la lingvon de Bamba-popolo, loĝanta en Norda Rodezio, disvendita (aŭ disdonita) ĝis plena eldonelĉerpiĝo. En Salomona insularo la ĉasista popolo de Marboj, nombranta nur dekmilon da homoj, ricevis lasta propralingvan Biblion, kies tradukado daŭris 25 jarojn. En la delto de Niger-rivero finis antaŭnelonge la tiea pastro-misiisto sian dumvivan laboron, la tradukadon de la Biblio en lingvon de popolo Aĝu. Jam ekzistas komplete Biblio en 14 lingvoj de Hindustano, el preskaŭ 200 lingvoj tie uzataj. Por Ĉinujo, de post 1949 aperis 43 eldonoj de la komplete Biblio, en kvanto de pli ol 170 000 ekz.

Memkompreneble, ke ĉiuj tiuj eldonoj ne estas gajnon portantaj el vidpunkto enspeza. Ili eĉ estus entute maleblaj sen helpo de mecenatoj kaj precipe sen idealistaj tradukistoj, kiuj parte tute senrekompence dediĉis la tutan vivon al la sankta laboro de laŭeble plej ĝusta tradukado. La civilizita mondo devas esti elkore danka unuavice al ĉi tiuj „nekonataj soldatoj” de la kulturportado kaj ankaŭ al la nekompareblaj meritoj de „The British & Foreign Bible Society”, kiu antaŭ jarkvino celebris sian centkvindekjaran jubileon (1804-1954).

II. Tra jarmilo de tradukpenoj

La unuajn tradukojn de Biblio faris la judoj por sia propra uzo. Ĉi tion necesigis ilia dissemiteco („diasporo”), dum la 3-a j.c. a.K., kaj de ĝi kaŭzita poioma funkciĉeso de la hebrea lingvo, ne nur en la landoj de ilia ekzilo, sed ankaŭ en ilia patrujo.

Ĉar en la permene reskribitajn rulaĵojn enpenetris eraroj kaj malĝustaĵoj (antaŭ, kaj eĉ post la kanonizado de la Biblio), la unuaj tradukoj respegulis ĉi tiujn erarojn kaj variantojn. Tial la *Septuaginto*, — la greklingva traduko de la „sepdeko” (— laŭ la Talmudo, — de 72 elektituloj: po 6 el ĉiu tribo), farita laŭ mendo de la Egipta reĝo-epigono, la librojn-ŝatanto Ptolemaeus Philadelphus (la II-a), enhavis multajn vort-kaj-senc-diferencojn kompare kun la teksto tradicia-aprobata, — la t.n. „masoreta”. De la tri poste sekvintaj greklingvaj tradukoj postrestis nur fragmentoj. Ni scias pri ili danke al la postrestaĵoj de la „Hexapla”, — la sesobla Biblio, kunmetita de Origenes (185-254), — unu el la unuaj Eklezipatroj. La „Hexapla” konsistis el la hebrea originalo, skribita per hebreaj literoj, kun la sama originalo reskribita per grekaj karakteroj. Aldone ĝi enhavis kvar tradukojn greklingvajn: 1) tiun de Aquila el Pontus, 2) tiun de Symmachus (traduko interpreta, klariga), 3) la Septuaginton, kaj 4) tiun de Theodotiono el Efesus. La „Hexapla” atingis nin nur en kelkaj fragmentoj, same kiel ties mallongigo, — la t.n. „Tetrapla”, — la kunigita kvarobla tradukaro.

La S^{ta} Hieronimo (340-420) en Beth-Lehem donis al ni latinan bibliotradukon „Vulgato” (= „vaste diskonigita”), dediĉinte al tiu ĉi laboro sian tutan asketan vivon. La Malnovan Testamenton li tradukis el la originalo, la Novan — el la greka (laŭ alia fonto: prilaborinte antaŭan latinan tradukon). Estas ĝi la teksto poste oficiale aprobata de la Romkatolika Eklezio.

Kelkfoje estis la Biblio tradukita en aramean lingvon. Unuavice estas menciinda la traduko de Onkelos, (1-a j.c. a.K.). Ne estas difineblaj la aperoj de la t.n. „Jerusalema Interpreto” (duversia), same kiel la „Samaritana Traduko”. La traduko de Jonathan ben-Uziel estis verŝajne farita dum la 5-a j.c. La siriaramea (aŭ siriaka) traduko de la ambaŭ Testamentoj ekzistas en kelkaj variantoj. Ĝi estas influita de Septuaginto kaj estis aprobata de la Siria Eklezio; ĝia verkotempo ne estas fiksebla.

La plej antikva traduko de la Biblio en la araban lingvon jam apartenas al la Mezepoko. Ĝin faris *rabbi Saadija Gaon*, ĉefo de la rabenlernejo en Sura (Mezopotamio), dum la 10-a j.c.

Al la antikvaj bibliotradukoj apartenas ankaŭ la kopta, la etiopa, la gota (tiu de Ulfilas, el 4-a j.c.) kaj la slava (de Cyrillus kaj Me-

thodius, el la 9-a j.c.). La slava traduko kreis tiam komunan tutslavan eklezian lingvon, dumlonge dominantan en la spirita vivo de multaj slavaj popoloj (Vidu la belegan albumeldonon: Jan Merell: Bible v českých zemích od nejstarších dob do současnosti; česká Katolická Charita 1956).

III. De laŭvorta jugo ĝis poezia flugo

La Reformacio kaŭzis la literaturan renesancon de multaj eŭropaj naciaj lingvoj. La angla bibliotraduko de W. Tyndale, la germana de M. Luther kaj la franca de J. Calvin, estis ne nur unuarangaj sciencaj atingoj, sed ankaŭ altnivelaj majstroverkoj en senco pure literatura. Sub influo de animon obsedanta, arda idealo, eĉ rigoraj doktrinuloj povas esti absorbataj per poezia inspiro. Aŭ, eble tutkontraŭe: nur poeziemaj naturoj povas esti obsedataj per diserĉaj revoluciaj idealoj. Tiel aŭ alie, la nomitaj tradukoj atingis la ŝtupon de perfektaj verkoj, forte influantaj je la samtempoj. Ili pliriĉigis la koncernajn lingvojn per novaj pensiloj: per imite kreitaj vortkunmetoj, esprimoj, parolformoj, eldirmanieroj kaj stiluzo. Tial iliaj tradukoj fariĝis fundamentaj ĉefverkoj kaj kaŭzis la disvolviĝon de bona literatura gusto kaj la ekfloron de la beletra kaj poezia arto.

Ankaŭ en multaj aliaj eŭropaj lingvoj ekfloris la literatura agado kaj atingis altnivelan evoluon post la apero de la bibliotraduko. La bibliaj frazeologio, lingvoformoj, esprimmanieroj, proverboj kaj citaĵoj enradikiĝis en la literaturaj verkoj kaj per ili en la ĉiutaga lingvouzo, pliriĉigante ilin laŭ enhavo. La slavaj lingvoj povas ĉitiarilate servi kiel bona ekzemplo. Iliaj unuaj skribnotitaj literaturaj provoj, dum la matenruĝo de ilia historia agado, ekkomenciĝis sub influo de la emfazaj Sanktaj Skriboj. La unua ilia sendependa literatura infaneca balbutado konsistis el transmeto de bibliaj esprimoj kaj parolturnoj en la sonojn de iliaj propraj lingvoj. Nur dum la lastaj jarcentoj la slavaj lingvoj forskuis de si abundan kvanton de antaŭe digestitaj hebreismoj.

Tamen jam en la pasinta jarcento aperis certgrada malkontento pri la „klasikaj” bibliotradukoj. Ĉar la nepra tendenco de la lastaj estis atingi ĝis la maksimuma ĝusteco kaj tiu ĉi estis akirita ofte per ne naturaj kaj per ne senperaj parolturnoj. Krom tio, ĉar dume ĉiuj eŭropaj lingvoj mem evolue aliformiĝis. Tial la „klasikaj” tradukoj certgrade arkaikiĝis. Jen kial devis veni nova vico de retradukoj.

Mi menciuri nur la germanan serenstilan tamen ĝustan retradukon de la filozofo Moses Mendelssohn, la samkvalitan rusan de O. Steinberg kaj la francan de L. Segond. Dum nunaj tempoj evidentiĝis la neceso prezenti bibliotradukon kontentigan en senco arta. Ĉar la Biblio estas verko ne nur religia, — almenaŭ por laikoj, — sed de plej alta arta kaj poezia valoro. Sklava precizeco de traduko deme-

tas ĝiajn poeziajn ornatojn kaj faras ĝin seka kaj sencnebula. El novaj tradukoj estas menciinda la germana arta retraduko, majstre plenumita, de la Jerusalema mondkonata filozofo-moralisto, prof. Martin Buber, en kiu li sukcesis konservi ĝustan sencprecizecon kaj ankaŭ la ritmon de la altnivela patosastila originalo. Similon penis prezenti ruslingve en sia Pentateŭko mia edukinto L. M. Kohnovski (Vilno, 1910), eminenta bibliekzegezisto. Ne pre mencienda estas ankaŭ la belega poezia bibliotraduko franclingva de Edmond Fleg, Versan tradukprovon de la Alta Kanto de Salomono en pola lingvo proponis Z. Bromberg-Bytkowski. Sed ĝi kiel pure arta verko, en senco ekzegeza, perdis sciencesploran valoron.

IV. La origino de la miskomprenoj

En la Biblio svarmas sencnebulitaĵoj: gramatikaj neregulaĵoj, sintaksaj malkorektaĵoj kaj aliaj lingvaj eraroj. Ankaŭ granda estas la nombro de malklaraj esprimoj.

La bibliaŭtoroj ŝatis uzi stilon multemfazan, altpoetikan kaj arkaikan; arkaikan por la verkadotempo. Ĉar tiel decas, laŭ ilia gusto, por temoj kaj aferoj laŭtradicie sanktigitaj, herede akceptitaj. Multaj tiaj arkaikaĵoj, elmodiĝinte, en postaj tempoj perdis la antaŭan signifon. Unu tian vorton la I-a libro de Samuel (IX, 9) klarigas: „kion oni nun nomas profeto, tion oni antaŭe nomis antaŭvidisto”. Aliaj vortoj kun tempforpaso ŝanĝis la antaŭan signifon kaj ricevis novan. Ekzemple, la vorto LEĤEM, unue signifinta nutraĵon, ricevis poste la signifon de pano, kaj en tempo intera ambaŭ signifoj estis alterne uzitaj (komparu: I Reĝoj IV, 22 kun I Samuel X, 4). Vivanta lingvo ofte ŝanĝas siajn vortvestojn kaj renovigas sian esprimtrezoron. Estas ĝi fenomeno lingvevolua. Kaj jen tiu ĉi fenomeno kondukis al miskompreno: dum la Vulgato akceptis la vorton LEĤEM en Psalmo 136, 25 (laŭ ties kalkulo — 135, 25) kiel „nutraĵo” (*qui dat escam omni carni*), akceptis ĝin Zamenhof laŭ aliaj tradukoj — „pano” (Ĉe Luther: *Speise*; ĉe Segond: *nourriture*; en la brita eldono: *food*; same en tradukoj rusa, pola kaj ĉeĥa).

En la Biblio svarmas ankaŭ ortografiaj eraroj. Kaŭzis ilin la fakto, ke en la plej antikvaj tempoj ĝi estis permane multfoje rekopiita. Dume povis enŝteliĝi aŭ elfali kelkaj literoj, aŭ eĉ vortoj. Nur dum epoko de la II-a Templo, oni komencis komparadi la tekstojn, fiksi la aprobindan kaj kunkalkuli la nombron de la versoj en ĉiu libro por eviti novajn erarojn. Sed la antaŭajn oni lasis netuŝendaj, pro la nekorektendeco de la Sanktaj Skriboj, nur notinte por memoro la ĝustigojn. Tiun ĉi laboron oni finis dum la epoko de Talmudverkado. La aprobitan tekston oni kanonizis, la plibonigojn notis aparte, kaj la tuton nomis: „masoret”, t.e. „akceptita tradicio”.

Alia kaŭzo de eraroj estis la neperfekteco de la antikva hebrea

skribarto, en kiu kelkaj literoj similas unu al la alia. Ekzemple, en Jeremia VI, 25 (Ne eliru ... ne iru...!) en la originalo estas skribita „AL TEC'I AL TELHI ...!”, — en ununombra porvirina imperativo; kaj la masoreta piednoto korektas: „AL TEC'U ... AL TELĤU...!, — en multnombra ambaŭseksa imperativo. Ĉar la literoj I kaj U en la hebrea alfabeto estas tre similaj.

La antikva hebrea skribarto ne konis la uzon de vokalaj literoj. Oni skribe prezentis la vortojn sole per la konsonantoj kaj lasis la vokalsonojn al la leganto diveni ilin. Poiome la skribarto evoluis kaj poste, kie urĝe necesis (kie la vorto komenciĝis aŭ finiĝis per vokalo), oni enkondukis „mutan literon”, kiu aludis, ke ĉiloke estas divenenda certa vokalo. Laŭ tia maniero ekz., MSH signifas MOSE (= Moseo). Kaj JRSLJM estas legenda „Jeruŝalajim” (= Jerusalemo). Tia skribsistemo povas kaŭzi malĝustan legadon kaj, sekve de tio, reskriberarojn. Kiam en la 6-a j.c. estis inventita sistemo de sublitteraj kaj superliteraj vokalpunktoj, oni tamen ne enkondukis ilin en la bibliajn pergamenrulaĵojn, por ne profani la tradicion. Poste tamen, kun la apero de la presarto, oni akceptis ilin por biblipresado.

Sed la presarto kaŭzis la aperon de novaj preseraroj. La esplora komparado de ĉiaj bibliaj variantoj, dum la lastaj du jarcentoj farita, malkovris aregon da vortdiferencoj kaj literdiferencojn. Ilin notis R. K i t t e l kaj poste prof. K a h l e, en de ili eldonitaj „*Biblia Hebraica*”. Kaj nuntempe ĝin revizie pliperfektigis la Jerusalema (antaŭnelonge forpasinta) prof. M. D. C a s s u t o.

V. Postsekvoj de spacŝparado

En la antikvaj pergamenrulaĵoj oni ne lasis sufiĉan distancon inter la vortoj. Tio kaŭzis kunfandiĝon de du apudaj vortoj en la postaj rekopiadoj. Aŭ tutkontraŭe, — al dispartigo de unu vorto.

Ekzemplo pri vortkunfando.

En Jesaja X, 25 tekstas jena strofo:

„ĉar ankoraŭ tre malmulte daŭros,
kaj finiĝos la kolero
kaj Mia furiozo je”

Sekvas ia stranga, senprecedenca kaj monstre strukturita vorto, nedifinebla laŭ senco: TVLJTM. La tradiciaj komentariistoj legas ĝin „*tavolitham*” kaj diversmaniere ĝin interpretas. Parto derivas ĝin de „TEVEL” kaj tradukas kiel Vulgato: „*scelus eorum*”. Same akceptis L u t h e r (*ihre Untugend*) kaj laŭ ili — Z a m e n h o f („iliaj malbonagoj”). Sed aliaj derivas ĝin de verbo „VALO” kaj tradukas: „iliaj ruinigoj” (*their destruction* — L. A n d r e w e s; *pour l' anéantir* — L. S e g o n d, kaj samsence en la tradukoj rusa, pola, ĉeĥa).

Ĝis la ekzegezisto S. D. L u z z a t o (1800-1865) proponis legi TVLJTM

kiel du kunfandiĝintajn vortojn TEVEL JITAM (= „mondo tutfiniĝos”). Tiam la verso akceptas kompreneblan aspekton:

„Kaj finiĝos la kolero

Kaj mia furiozo je mondo tutfiniĝos”.

La klarigo redonas al la strofo la kutiman paralelismen (senc-aŭ-vort-ripeton), la tiel karakterizan kaj nepran kondiĉon de la profeta versarto.

La sekvonta ekzemplo montras, kiel unu vorto disiĝis je du, pro la trodensa skribado.

La psalmo 106;7 tekstas:

„Kaj ili ribelis apud la maro, apud la Ruĝa Maro”.

En ĉiuj tradukoj aperas la sama superflua vortripeto „apud la maro” (AL JAM). Sole la Septuaginto anstataŭigas ilin per „alirintoj”, kio hebree povus esti OLIM. Kaj la verso tie tekstas: „Kaj ili ribelis alirinte al la Ruĝa Maro”. La dispeciĝo de vorto OLIM je du AL JAM solvas la enigmon pri la sencmanka kaj vana vortripeto.

La spacŝparado en la antikvaj pergamenoj kaŭzis la postan neceson „enŝovi” etajn literojn en la lokojn, kie iu litero erare elfalis. Tial eĉ en la nuntempe presataj hebreaj Bibliojoj aperas en la unua vorto de libro Levidoj eta enŝovita „alfo” (A en la vorton WAJIKR^A) kaj eta superpendanta N en verso 30, ĉap. XVIII de Juĝistoj. Sed pri la lasta — temu aparte.

VI. Falsiga „redakto”

Pri unu intenca falsprovo ne povas esti duboj.

La XVII-a kaj la XVIII-a ĉap. de Juĝistoj rakontas pri certa Levido, kiu ne trovis okupoficon en la diservado en Bet-Lehem, en lia naskiĝurbo kaj tial ekvagis tra la lando por serĉi azilon. Kial li ne povis trovi pastran okupon en sia propra urbo, dum ĉiu Levido herede ricevis diservan oficon? Ĉu oni malgraŭ la leĝoj kaj spite al la konvencia kutimo ekskomunikis lin? Ĉu ĉar li estis june orfiĝinta kaj senprotektita nedezirindulo? Ŝajnas, ke ĝuste tial. Verŝajne li eĉ estis multpreten-dema, konforme al siaj heredorajtoj kaj tial konkure danĝera. Tial aŭ alikiale, la junulo estis devigita multe suferi kaj longe vane vagi tra landoj de Jehuda, Benjamin, Dan kaj Efraim. Ĝis malesperiĝinte, alĝvidita al malsato kaj konsterno, li perfide devojiĝis kaj konsentis akcepti idolservan pastran oficon. Li certe travivis profundan enkoran dramon perfidante la idealojn de patro kaj avo...

Poste venis rabista bando de elmigrintaj Danidoj survoje al urbo Laiŝ, kunprenis tien la Levidon kaj konkerinte la urbon establis tie idolservan templon, en kiu pastris nia Levido.

Nun la kronikisto finfine konsentas prezenti al ni la Levidon laŭnome. Estas li neniu alia ol Jehonatan, filo de Gerŝom, filo de ... MSH!

La reskribintoj de la libro, aŭ la kanonizintaj ĝin „redaktoroj” certe

ĉiloke sentis sin malagrabla surprizitaj, eĉ forte ŝokitaj: la nepo de Moseo, la leĝodoninto fariĝis perfidulo! Ĉu estas honte profaninda la honoro de Moseo per ĉi tiu provoka rakonto? Eble estas lia nomo maske kaŝinda? Kaj la „cenzuristoj” decidis enŝovi en la nomon superpendantan N, por ke ĝi estu legota M^NSH — Menase!...

De tiam en ĉiuj hebreaĵ Biblioj kaj en ĉiuj tradukoj estas skribita Menase. Nur la korektita Vulgato malkaŝe nomas: *fili Moysi*...

La tradiciaj komentariistoj disputas: ĉu vere temas pri nepo de Moseo, aŭ ne? Kelkiuj ekzegezistoj konsentas, ke — jes, la nepo de la granda avo.¹⁾ Sed ni konkludas: cenzurista falsiga provo!

VII. Kiel do oni traduku?

En la klasika hebrea lingvo, ofte la sama radiko povas porti plej diversajn sencojn. La verbo NAŠAK, povas ekzemple signifi: esti regata, esti armata, esti almetata, kisi, altuŝi, k.s.

Parenteze mi rimarkas, ke la imperativan U-formon, Z a m e n h o f verŝajne fiksis en Esperanto imitpreninte ĝin el la hebrea.

La substantivo BOR signifas *puremo, senkulpeco*; de ĝi derivita adjektivo BAR (VAR) signifas *klareca, serena*, dum BAR (VAR) aramee signifas *filo*.

NAŠKU VAR! — postulas verso 12 en psalmo 2-a de la Psalmaro. Kaj la esprimo estas enfalilo por ĉiu tradukisto. „Armu vin per korveremo” komentklarigas ĝin prof M. D. C a s s u t o; „obeu sinceranime” — proponis la mezepoka R a ŝ i, sed „kisu la filon” — supozis M. E v e n E z r a (1055-1135). La Vulgato akceptis jenan sencvarianton: „*Apprehendite disciplinam*” — laŭ la Septuaginto, dum la reformaciaj Eklezioj preferas „kisu la filon” kaj kelkiuj eĉ manifeste anoncas: „Kisu la Filon!”

Tiel la simpla leganto staras antaŭ nesolvebla enigmo, kies komprenebleco jam delonge malaperis en ĝangalo de elmodiĝintaj, arkaikaj lingvaj formoj, perdiĝintaj esprimsignifoj kaj difektiĝintaj vortoj.

La Majstro tradukis: „kisu la filon”. Kaj sen ia influo flanke de komitatanoj de Brita kaj Alilanda Biblia Societo. Pri tio priatestas

¹⁾ Nur la unuaj 16 ĉapitroj de la libro „Jugistoj” estas laŭtempe sinsekve ordigitaj kronikoj. Ek de ĉapitro 17a venas *epizodoj* el tempoj *antaŭaj*, kies tendenco estas doni ĝeneralan karakterizon de la epoko kaj pruvi la pravecon de la posta popola postulo, enkonduki heredan reĝecan regnoformon en Izrael. („En tiu tempo ne ekzistis reĝo en Izrael; ĉiu faradis tion, kio plaĉis al li” — estas kvazaŭ refreno de ĉiu el tiuj ĉi ĉapitroj.)

La plejmulto de ekzegezistoj laŭ multaj konsideroj atribuas la okazon pri idolo de Miha al jugtempo de Otniel (Jugistoj III).

d-ro Immanuel O l s v a n g e r, ano de Akademio de Esperanto (Jerusalemo). Li rakontis jenon:

„Mi demandis d-ron L. Z a m e n h o f, kiam aperis lia traduko de la Psalmaro: kial li ĝuste elektis ĉi tiun sencvarianton? Pri kiu temas lia opinio en tiu ĉi verso? Kiun oni kisu? Kaj d-ro L. Z a m e n h o f respondis, ke ĉar la aŭtoro de la psalmoj estis la reĝo David, sekve la verso „*kisu la filon*” estas ordono obeakcepti la reĝidecon de lia filo Salomono.

La supra „anekdoto” povas servi kiel respondo je la demando: kiel decas tradukadi la bibliajn dubajn tekstojn? Oni traduku laŭ konscio kaj laŭ konscienco; laŭ bonkompreno kaj bontrovo, — kiel eble plej proksime al la senco sincerkore ĝusttrovita.

VIII. La konkordanco de D. B. G r e g o r

Estas ĝi sendube interesplena kaj multvalora kompila verko, komparanta la Zamenhofan bibliotradukon kun tradukoj alilingvaj, cele traekzameni la ĝustecon de la laboro de nia Majstro kaj por povi konkludi pri ĝiaj kvalitoj. La aŭtoro multklopode kaj diligente komparis en 518 signifdubaj, aŭ sencmalklaraj versoj la Zamenhofan tradukon kun la originalo kaj kun multaj alilingvaj tradukoj. Kun la klasikgreka Septuaginto, kun la latina Vulgato, kun la antikva gota traduko de W u l f i l a s kaj kun la siriaramea (siriaka) „Peŝita” (sign.: „Simpla”). El la nuntempaj lingvoj, la aŭtoro, — cetere enviinda poligloto —, uzis por sia komparlaboro Bibliojn en lingvoj: angla (tri diversepokajn retradukojn), franca, germana, hispana, itala, kimra, nederlanda, rusa kaj pola. Tiel lia laboro, verdire indas esti nomata „dekkvinbiblia konkordanco”. Vere formika studkomparilo!

La 518 dubajn komparindajn lokojn la aŭtoro elektis, el multe pli multenombra aro da tiaj, laŭ tio, ke ili estis pritrakitaj en teologiaj aŭ ekzegezaj verkoj de diversaj bibliexploristoj, kiel P e a k e, M o f f a t t, D u p o n t kaj aliaj.

En la antaŭparolo rakontas la aŭtoro pri la taskoj de sia verko. En la sekvanta enkonduko li skizas la historion de la Zamenhofa bibliotraduko, kiu estas, laŭ rimarko tre trafa, de S-ro W a r d e n: „lia ĉefverko krom la kreado de la lingvo mem”.

La unua ĉapitro enhavas skizon pri la antikvaj bibliotradukoj kaj komparas 13 lokojn nekongruajn ĉe Z. kaj Septuaginto. Sed sekvas 7 versoj, en kiuj ambaŭ identiĝas, kontraŭ ĉiuj malsamaj alilingvaj tradukoj. Sammetode analizas la aŭtoro la ceterajn antikvajn tradukojn, komparante paralele 7 versojn kun Vulgato, 4 kun Peŝito kaj 1 kun la gotlingva traduko de W u l f i l a s.

Laŭ la tekstkomparoj, la aŭtoro tutprave konkludas, ke Z. ne uzis la famkonatan pribiblian leksikonon de G e s e n i u s. Tamen li notas

(ĉap. IV), ke laŭ 30 aliaj versoj, nocioj de Z. koincidas kun la ekzegezaj konkludoj de Gesenius. Se restus konserviginta la libraro de la Majstro post la nazia barbarmastrumado en Varsovio, la problemo estus facile solvebla. Ĉar ne forrestis dokumentitaj pruvoj, mi permesas al mi supozproponon: probable uzis Z. por siaj tradukceloj la hebre-rusan (kaj arame-rusan) pribiblian vortaron de O. Steinberg (eldonado de L. Mac, Vilno, 1878), kiu estis tiam en Rusujo populara inter la biblistudantoj. La suprenomita ekzegeza leksikonverko enhavis la plej gravajn esploratingojn de multaj antaŭaj leksikografoj, kiel Gesenius, Dietrich, Fürst, Graetz kaj aliaj.

Interalie, konstatas la aŭtoro, ke la traduko de Z. multloke koincidas kun tiu de Septuaginto. Estas certe, ke tradukante Z. kontroladis sin mem laŭ tradukoj alilingvaj, precipe laŭ la rusa sinoda. Kaj tiu mem plejofte sekvis la version de Septuaginto ... Krom tio, povas esti, ke Z. eĉ enrigardis en ĝin, sciposedante la klasikgrekan (almenaŭ teorie), laŭ siaj gimnaziaj studoj, kie la greka estis deviga fako.

IX. Komparo kun la modernlingvaj tradukoj

En sekvantaj du ĉapitroj, — en ĉiu post necesaj enkondukoj kaj konkludrezonoj, la aŭtoro prezentas paralelajn komparojn de esperantaj tekstoj kun tiuj en diversaj nunaj lingvoj. Unue tiujn, kie la esperanta traduko koincidas kun unu, aŭ kun kelkaj alilingvaj tradukoj, sed ne akordiĝas kun pluraj aliaj, laŭ la skemo:

- 1) trad. esper. + germana kontraŭ diversaj aliaj
- 2) „ „ + rusa „ „ „
- 3) „ „ + germ. + rusa „ „ „

k.t.p., — 15 diversaj kombinoj, temantaj pri 331 traekzamenitaj versoj.

Nova ĉapitro estas dediĉita al la reciproka komparo de Zamenhofaj tekstoj kun alilingvaj, ĝuste tiaj, kie la unuaj diferencas de la lastaj. Ĝi ampleksas 140 dubajn versojn. Sekvas konkludfara, analiza ĉapitro, en kiu la aŭtoro deduktas, ke:

- 1) la esperanta tradukanto bone konis la rezultojn de la moderna (— siatempa; rim. de J.K.-C.) biblia kritiko;
- 2) li evitis lasi verson nekomprenebla, strebante al maksimuma klareco;
- 3) li eĉ permesis al si, tiuĉicele, enŝovi en la frazojn vortojn ne troviĝantajn en la originalo, kiujn la lasta ellasis (pro konsideroj de stilo, de ritmo, pro vortŝparemo, aŭ alikaŭze).

Fine la aŭtoro (tutprave!) konkludas: „Kunigante ĉiam la klarecon kaj la ekzaktecon, ĝi (la trad. de Z.) sukcesis esti samtempe konservativa kaj originala. Tiamaniere ĝi kontentigas kaj la tradiciemulojn kaj tiujn, kiuj konscias ke estis bezona

nova traktado ... La esper. trad. ne cedas al iu ajn el la naciaj Bibliojoj ... la M. T. esperanta meritas altan lokon inter la grandaj Bibliojoj de la mondo.”

Restas esplorinda la problemo, en kia grado influis la „Biblia Komitato” de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo je la Zamenhofa traduko kiel „redaktoraro”. Speciala ĉapitro de S-ro D. B. Gregor pritraktas ĉi tiun temon. Tiucele li komparas la librojn de „Eliro”, tiun laŭ eldono de la firmo H a c h e t t e en Parizo kun tiu laŭ la britsocieta Biblio. Li trovis kaj traanalizis 150 vortvariantojn. La redaktoroj sendube iomete bridis la interpretajn modernokritikajn konceptojn de Z., alproksimigante lin plurloke al la tekstkompreno pli tradicia. Tamen la aŭtoro laŭdas la laboron de la B. K. kaj konklude emfazas, ke: „la esperanta Malnova Testamento estas harmonia kunfandiĝo de la tradicia kaj la moderna interpreto” — danke al la scienca redaktado de ĉi tiuj aŭtoritatuloj.

X. La karaktero de la verko

La dekbiblia konkordanco de S-ro D. B. Gregor laŭintence ne estas verko ekzegeza, sed ĉefe kaj precipe esperantologia. Ĝi esploras kiel tradukis Z. la Biblion per komparo kun la alilingvaj tradukoj kaj kiaj estas la specifaj kvalitoj de la Zamenhofa verko.

Se estus la tasko de la aŭtoro ĉefe ekzegeza, tiam la esplormetodo devus esti tute alia. Tiam kiel bazo devus servi la abundkvantaj malklaraĵoj de la originalo komparotaj unue kun la Zamenhofa traduko kaj poste, ambaŭ tekstoj kune, kun la alilingvaj tradukvariantoj.

Fakte, la 518 dublokoj estas nur ereto en la netrairebla ĝangalo de miskomprenblaĵoj de la originalo. Sed la plimultaj el ili ne estas rimarkeblaj en la tradukoj. Ĉar ĉiu tradukisto estas vole-ne-vole interpretisto. Tradukante li elektas ne nur trafkonvenan vortnocian substituan, sed ankaŭ liaopinie, aŭ liaguste la plej konforman sencesignifon por la frazideo. Tial leganto de ia ajn bibliotraduko transpasas ian interpretan ponton, eĉ ne rimarkante super kia abismo de nekompreneblo ĝi pendas.

Sekvante laŭ la supremenciita ekzegeza esplormetodo, mi prenas ekzemple unu el la plej antikvaj glor-odoj de la mondpoezio, — la venkkanton de Debora (Juĝistoj V). En tiu ĉi odo abundas miskomprenblaĵoj pro ties arkaikiĝintaj stilo kaj gramatikaj formoj. La oka verso de tiu ĉi kanto deziras diri, ke kiam la popolo ĉesas servi la veran Dion kaj elektas anstataŭe la idolservadon, tiam ĝi, la popolo, restas dum milito senarmila. La originalo diras: „Oni elektis novajn diojn, — tiam milito [okazas; la vorto mankas] ĉe pordegoj (urbpordegoj — laŭ komprenendo)”. La leganto laŭ ia ajn traduko kviete transiras la

ponton bonkomprenante la ŝajne klaran tekston. Ĉar li ne scias ke „tiam militas pordegoj”, en originalo „AZ LaĤeM ŜeARIM” (minuskle mi transdonis la mankantajn vokalojn), estas esprimo ne komprendebla. Precipe pro la nekutima formo de la vorto LaĤeM, stranga laŭ gramatika nereguleco (milito? militis? militos? pano? manĝaĵo?). Tamen la Vulgato (same kiel la Septuaginto) tradukas: *et portas hostium ipse subvertit*. Kaj postsekvante ĝin diras la angla trad.: *then was war in the gates*; la franca: *alors la guerre était aux portes*; la rusa (esperantlitere): *ottho vojna u vorot*; pole: *tedy bywala wojna w bramach*; ĉeĥe: *tedy byvala válka v branach*; kaj same bulgare kaj litove. Nur la germana prezentas komprenvarianton: *Ein Neues hat Gott erwählt, er hat die Tore bestritten*. Nur la leganto de la originalo falpuŝiĝas ĉe la signifduba, strangforma LaĤeM. La enigmon eble solvis la prezidanto de la Hebrea Lingva Akademio, prof. N. H. T u r s i n a j, proponante sian tekstplibonigon. Laŭ lia opinio, la reskribantoj erare formovis du konsonantojn, la lastajn de la unuaj du vortoj, alligante ilin al la du apudaj postsekvantaj vortoj. Kaj la verso

AZ LaĤeM ŜeARIM verdire devas aspekti:

AZaL ĤoMeŜ ARIM.

Nun la novaperinta frazo signifas: „malaperis armaĵo de urboj”, — kio tutplene konformiĝas al la sekvanta versa frazo: „nek ŝildo videbliĝis, nek lanco, ĉe la kvardek miloj de Izrael”. Ĉi tiu versrestarigo redonas al la verso la ritman kaj la sencan „ekvilibron” per la nepre postulata senc-paralelismo: de unu flanko — „malaperis armaĵo de urboj” kaj de la dua — „nek ŝildo videbliĝis, nek lanco, ĉe la kvardek miloj de Izrael”.

Sed ĉar la verko de S-ro D. B. G r e g o r baziĝas ĝuste sur la Zamenhofa esperantlingva teksto, ĝi tial estas precipe esploro esperantologia, ebliganta al ni konvinkiĝi pri la perfektaj tradukatingoj de nia Majstro, kompare al multaj aliaj nacilingvaj Biblioĵ.

XI. Tamen ekzegeza avantaĝo

Por pure esperantologia studo ne estas nepre elektindaj por interkomparado ĝuste la sencmalklaraj versoj de la Biblio. Sufiĉus elekto de belaj, sed ordinaraĵaj versoj komparataj kun alilingvaj tradukoj por dedukti pri la lingvaj kvalitoj de la esperanta teksto. Sed elektinte ĝuste la dubajn kaj pridisputindajn, la aŭtoro tamen prezentis al la ekzegezistoj valoran kontribuon por iliaj esploroj. La biblistudemulo trovos en la verko de D. B. G r e g o r sisteme kaj laŭmetode ordigitan materialon, kun oportunaj indoksoj, kun riĉa komentario, kun (bedaŭrinde, ne vasta) bibliografio. Kaj aldone li povos mediti pri la ĝeneralaj kaj la pridetaj konkludoj de la aŭtoro, kiuj, kiel decas al vera sciencesploranto, estas tre singardeme kaj kun rezervo esprimitaj.

Jen ekz. la multe pridisputita, la fame konata verso el Jesaja VII, 14: „Jen la ALMA gravediĝis kaj ŝi naskos filon kaj ŝi nomos lin Immanuel”. La Zamenhofa traduko (miaopinie: korektita de la Biblia Komitato) sonas jene: „Jen virgulino gravediĝis kaj ŝi naskos filon kaj ŝi donos al li la nomon Emanuel”. En la Vulgato same kiel en la Septuaginto tekstas: „*Ecce virgo concipiet*”. Laŭ Luther (eldono de Württembergische Bibelanstalt, Stuttgart, aprobita de la Evangelia Eklezikomitato), la ALMA estas „*eine Jungfrau*” kaj la tuta strofo estas per kursivo alude presita. La rusa traduko estas same aludplena: la vorto ALMA signifas virgulinon („*djeva*”, esperantlitere), sed estas per majusklo presita, same kiel la sekvantaj vortoj „filo” kaj „li” (— „naskos Filon kaj donos al Li la nomon...”). La angla traduko mencias „*a virgin*”. Samsence tradukas la biblioĵ bulgara kaj litova. Sed L. S e g o n d forrifuzas ĉi tiun nepravigeblan vortkomprenon kaj tradukas „*la jeune fille*”. La pola kaj la ĉeĥa biblioĵ uzas la vorton „*panna*” — „junfraŭlino”.

S-ro D. B. G r e g o r malmultvorte mencias: „Tradukoj esperanta kaj tradicia: Jes. VII, 14 — *virgulino*; moderna — *juna virino* (laŭ G e s e n i u s; laŭ P e a k e: *Commentary on the Bible*; laŭ *The Clarendon Bible*, Oxford). Kaj en suba noto rimarkas:

„La hebrea vorto povas signifi nur «juna virino de edziniĝa aĝo», sed la Septuaginto havas «virgulino». Ĉu temas pri alia tradicio aŭ simpla mistraduko, oni ne povas konstati. Ĉi tio tamen estas certa: la dogmo de la virgulina naskiĝo de Jesuo ne baziĝis sur ĉi-tiu verso; kontraŭe, tiu dogmo aludigis ĉi-tiun verson al Jesuo».

Por trankviligi la konfuziĝemulojn la aŭtoro, en la antaŭparolo avertas: „...ne-teologiistaj sinceraj Kristanoj, kiuj amas la Biblion, trovos sin eble ĝenataj pro la sciiĝo, ke en tiom da lokoj la signifo de la Dia Parolo ne estas klara. Al ili mi diras: trankviliĝu; neniu doktrina punkto estas tuŝata... Kio gravas, estas ke la homo ĉiam strebu al la vero...”

En tiu ĉi senco, de homspirita strebo al scienca esplorado de vero kredata, estas la valora verko de S-ro D. B. G r e g o r tre laŭdinda kontribuo.

839.31-94-6 Frank .03 = 089.2

839.31-94 FRA

Taglibro de Anne Frank (La Postdomo); 12 junio 1942 - 1 aŭgusto 1944. — El la nederlanda originalo tradukis G. J. Degenkamp. 219 paĝoj, 13,5 × 19,5 cm². Kun sep tutpaĝaj ilustraĵoj kaj situplanoj de la „Postdomo”. Tole bindita, kun ora surpriso. Prezo gld. 7,80 aŭ 2,15 dol. aŭ 31,2 steloj. Eldono: Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.